Christoph Klausener,

# Mutiĝis ĉiuj birdokantoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

De l' birdoj kantaj melodioj
ne plu aŭdeblas nun ...
Nudiĝas kverkoj kaj tilioj,
malsupren falas la folioj
en nokton de aŭtun'.

La fagoj de espero via
jen staras sen foli' ...
Ne plu videblas stelo ia,
kaj tra nebul' melankolia
trairi devas vi.

Abioj de tristeco via
nur jen rektigas sin ...
En via brust' kaŝendas ĉia
memor' somera idilia –
en vi ardigu ĝin.

. . .

Christoph Klausener,

# Mutiĝis ĉiu bird' kantanta

*tradukita de Hans-Jörg Kindler*

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

. . .

*Traduko de la Germana poemo “Verstummt sind alle Vogellieder” de* Christoph Klausener *(Jean-Willibrord (Willy) Schmit, ∗1917-12-30 – †1982-08-28) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2001-11-03.*

*Arg-41-82 (2003-12-24 01:07:04)*

*MR-369-3 Christoph Klausener, kies civila nomo estis Jean-Willibrord Schmit - li uzis la voknomon Willy - estis luksemburga lirikisto. Li naskiĝis en 1917 en la Luksemburga urbo Echternach kaj mortis en 1982 en Weilerbach en Luksemburgio. Li studis en la universitato de Freiburg en Svislando kaj poste gvidis la familian entreprenon. Parton de sia vivo li pasigis en la Benediktena abatejo Sankta Maŭricio (St. Maurice) en Clerf en Luksemburgio. Krome li aktivis en la tuteŭropa (paneŭropa) movado. Inter la jaroj 1939 kaj 1982 aperis ses poem-volumoj de li. Pluaj indikoj pri W. Schmit (Chr. Klausener) estas troveblaj en la aŭtoro-bild-leksikono “Lichtband-Autoren-Bildlexikon”, eldonita de P. Koryllis, Dülmen 1980. La rajtojn pri liaj verkoj posedas lia filo Carlo Schmit (4, rue Michel Lucius, L-1949-Howald). Li donis la permeson por la publikigo de la poemo en tiu ĉi datumbenko. Por pluaj publikigoj pere de aliuloj necesas speciala permeso de s-ro Carlo Schmit.*

*Traduko de la Germana poemo “Verstummt sind alle Vogellieder” de* Christoph Klausener *(Jean-Willibrord (Willy) Schmit, ∗1917-12-30 – †1982-08-28) en Esperanton de* Hans-Jörg Kindler *(Trixini).*

*Arg-41-81 (2003-12-23 23:00:24)*